

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

December 1944

32 årg. Nr 12

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

## Bokens dag.


I december månad infaller en av esperantisternas stora högtidsdagar, bokens dag. Den firas så nära inpå den 15 december, som lokala förhållanden göra det möjligt. Den 15 december är doktor Ludvig Zamenhofs födelsedag, och Bokens dag är en hyllning till hans minne, helt i linje med det verk esperantospråkets fader givit oss i arv. Ett språk lever sitt högsta liv på bokens blad, nej, på böckernas blad. Det gäller ej att skaffa fram en volym hur tegelstensstor den må kunna bli, det gäller att skaffa fram böcker, och många böcker, i alla de tusen fack, i vilka människor odla sina intressen. Därför är den propaganda för Boken med stort B, som esperantisternas Bokens dag utgör, så viktig och den form de valt för att fira dagen så riktig. Varje esperantist köper den dagen minst en ny esperantobok.

\*

Detta är den viktigaste programpunkten och den delen av programmet är lika lätt att fullgöra för den isolerade esperantisten som för den som har tillfälle att sammanträffa med andra till festlig samvaro på högtidsdagen.

Ske alltså. Men... säger läsekretsen, var ska vi i år finna den nya boken? — På den frågan ge våra annonspalter i dag besked. — Antalet nya böcker är inte så

Från en utställning (se Sundsvall sid. 88.)



stort —. Nej, tyvärr, men observera, att sådana inte saknas, och en enda ny esperantobok är en stor sak i dessa tunga dagar. Men märk att med en ny bok menas inte ovillkorligen en nytryckt bok. Det gäller närmast en ny bok på din egen hylla. Och då kanske att våra boklistor ännu ha nytt att bjuda på.

## PRENUMERATIONENS ANMÄLAN.

Ett nytt år stundar. År.1945 skall Svenska Esperanto-Tidningen komma med sin 33-e årgång, och redan detta enkla meddelande är en stor sak, om man betänker de svårigheter, som esperantorörelsen har att kämpa med.

Vårt löfte att komma baserar sig nu som alltid på vår vissa förhoppning att vår trogna läsekrets inte skall svika oss och inte bara inte svika oss utan även förhjälp oss till nya läsare och abonnenter. Som vanligt begära vi t.o.m. ännu mer av våra vänner. Vi begära deras aktiva medverkan i spalterna, och här äro vi skyldiga att i denna anmälan för 1945 inflika ett tack för all hjälp under 1944.

Vårt program för 1945 blir detsamma som tidigare. Vi skola vara organ för Svenska Esperanto-Förbundet och följaktligen deltaga i förbundets alla arbeten som förmedlare av rapporterna utifrån och meddelanden inifrån centrum och utåt samt givetvis deltaga i propagandan för

esperantospråkets utbredning. Därtill hoppas vi kunna bjuda på så mycket litterärt esperantogods, som vårt tyvärr alltjämt ganska knappa utrymme medger, och vi ämna 1945 t.o.m. komma med en liten nyhet, nämligen en följetong, och för den ha vi valt en av den kände esperantoveteranen Hj. Dahlén gjord översättning av dr Wallquists ("Lappmarksdoktor") skildringar av en läkares upplevelser i den svensk-norska gränsbygden.

Prenumerationspriset blir för kommande år detsamma som hittills, eller kronor 4:—. Med detta nummer följer ett inbetalningskort, och vi veta att expeditionen är mer än tacksam om detta insändes omedelbart eller åtminstone före årets slut. Om så sker, besparas expeditionen en myckenhet extra arbete och dyrbar tid, som kan användas för andra viktiga uppgifter.

Red.

## La mondlingva problemo.

De Doktoro Björn Collinder, profesoro de finno-ugraj lingvoj ĉe la universitato de Upsala, Svedujo.

(La sveda universitata profesoro Björn Collinder estas unu el la plej lertaj "all round"-lingvistoj de la nuna tempo. Ĉi suba artikolo, verkita de li, aperis en la oktobra numero de la sveda popolinstruista gazeto, sed certe liaj vidpunktoj interesas multajn aliajn.)

La Diaĵo estas enviema, diras Herodotos. Tiu sama ĝenerala ideo subestas kiel bazo de la antikva legendo semida pri la Babela konfuzo, sed en la apliko de la superstiĉa penso verŝajne komunehoma troviĝas profunda saĝo. Se la homoj havus okazon unuigi siajn fortojn en senĉesa kunlaboro, nenio estus al ili malebla. La enviema Diaĵo ne vidis por si alian vojon ol dispartigi la homaron, kaj la plej efika rimedo por tio estis depreni de la homoj ilian komunan lingvon, por ke ili ne povu kompreni unu la alian. La naturdotita unueco kaj la historie donita disiĝo de la homaro, la nemezureblaj ebloj, kiujn donas la homa laboro aŭ povus doni, se nur kuniĝus la fortoj anstataŭ disiĝi kaj turniĝi kontraŭ si reciproke, la unuiganta kaj disiĝanta potenco de la lingvo: ĉio tio ricevis klarbildan esprimon en la mallonga rakonto pri la turo Babela.

La homaro ankoraŭ nun estas submetita al la Babela konfuzo. Multaj ne rimarkas kiel malutila kaj malinda estas tiu konfuzo. Ili ne havas sufiĉe da fantazio por povi imagi al si pli bonan ordon de aferoj.

En nia lando tiu opinio estas tre ordinara ke la demando pri interkompreniĝo komunehoma estu solvata en tia maniero ke ĉiuj homoj lernu la anglan lingvon. Mi kredas tamen ke mi povas certigi ke tiu ĉi opinio estas malmulte disvastigita en la angle parolanta mondo. Kiam la mondlingva demando estis diskutata siatempe en la Ligo de Nacioj, rekomendis la anglan lingvon nur la reprezentantoj de Svedujo kaj de Norvegujo, dum kontraŭe anglo pledis por esperanto.

Je supra vidaĵo vido la penso pri la angla kiel la unuiga lingvo de la tuta mondo ŝajnas havi bonajn motivojn. La angla iamaniere estas jam mondlingvo, aŭ se oni tion preferas: la mondlingvo antaŭ ĉiuj aliaj. Ĝin parolas proksimume du cent milionoj da homoj kaj ĝi estas studata en la superaj lernejoj ĉirkaŭ la tuta tero. Ĝi estas la lingvo de la marveturado kaj de la mondkomerco. Kiel lingvo de la diplomaro ĝi estas jam preta forpreni la francan. Post la nuna mondmilito ĝi atingos pozicion ankoraŭ pli fortan ol pli frue.

### La facile lernebla . . .

Al ĉio ĉi tio oni kutimas ankaŭ aldoni la elokventan argumenton ke la angla estas lingvo facile lernebla. Enestas ja iom da senco en tiu aserto. Tiel nomatan anglan lingvon maristan, per kiu oni povas malperfekte — ho kiel malperfekte — trovi vojon en fremdaj havenoj, oni lernas sufiĉe rapide. Sed se oni volas lerni legi anglajn librojn, oni pli-malpli frue — eble nur post multaj jaroj da studado — konscios ke la angla vortrezoro estas nemezurebla. Paroli angle tiom bone ke oni povas valorigi sian opinion en debato kun angloj aŭ amerikanoj, tio estas arto, majstrata nur de minimume malgranda parto frakcia el tiuj kiuj proklamas en tiel kredocerta maniero ke la angla devas fariĝi la mondlingvo. Kaj skribi ion en tiel bona angla lingvo ke ĝi povas esti presata, tion ne tre multaj svedoj kapablas. Eĉ la specialistoj, kiuj dediĉis sian tutan vivon al studado de la angla lingvo, devas lasi al ennaskulo kontroli kaj korekti tion kion ili skribis, antaŭ ol ili riskas doni ĝin al presejo. Ĉion konsiderante oni povas diri ke la angla lingvo ne nur estas malfacila por lerni: en la praktiko montriĝis neeble lerni ĝin al homo, kiu ne havis okazon vivi multajn jarojn en angle parolanta lando.

Nun la servemaj pledantoj por la angla kompreneble respondas, ke nepre ne estas necese lerni la anglan lingvon perfekte; sufiĉas se oni povos malperfekte sin komprenigi. Nu, se nur tiel simpla estus la afero! Sed nun estas ja tamen fakto, ke granda parto de la interpopola interrilatiĝado konsistas el traktadoj kaj debatoj, en kiuj intereso staras kontraŭ intereso aŭ opinio kontraŭ opinio. Eĉ tiuj, al kiuj mankas ĉia sperto de interpopola kunestado, sendube povis el sia hejma-areno observi, ke oni

prefere ne sendas al vivgravegaj traktadoj reprezentantojn, kiuj balbutas kaj lispas kaj fuŝparolas kaj kiuj ne povas respondi senprokraste kontraŭdiron sed nur kapablas en ŝanceliga kaj pli-malpli nekomprenbla maniero antaŭlegi laŭ manuskripto. Ĉiu homo scias, ke tiaj pledantoj malbone sukcesas antaŭ kontraŭulo, kiu havas en sia povo la parolon. Kaj laŭ tia sama maniero okazus al la plej multaj el la svedaj probatalantoj de la angla lingvo, se ili devus efektiviĝi en ago sian doktrinon. Tamen multaj el ili studis dum dekoj da jaroj la anglan lingvon.

### Imagu al vi . . .

Ni ĉiuj aŭskultis en foiroj eksterlandajn cirkoartistojn kaj ĉarlatanojn, kiuj parolaĉis nian gepatran lingvon en maniero, kiu ĉiam efikis ridinde kaj foje vere abomene. Imagu al vi tian homon vestitan en jaketo kaj stria pantalono fari emocie solenan oratoradon ĉe la tombo de heroo, tiam vi havos almenaŭ konjekton pri tio, kiel anglo sentas en sia animo, kiam ordinara svedo instruita — eble precize unu el tiuj kiuj plej fervore insistas ke la angla estu akceptita kiel mondlingvo — parolas la anglan lingvon ĉe ia solena okazo.

Kaj tamen ni ĉiuj komprenas ĉion kion diras la ĉarlatano! (La anglo ne estas en la sama feliĉa situacio, aŭskultante aŭ penante aŭskulti la anglan oratoradon de vermlanda aŭ smolanda partoprenanto de bankedo.) Sekve ludas rolon ankaŭ diversaj aliaj cirkonstancoj ol nur malperfekte komprenigi sin. Oni devas ankaŭ esprimi sin iomgrade korekte. Kaj en la korekta prononco, la korekta elekto de vortoj, la korekta vortordo, enhaviĝas multo da subtilaĵoj, kiuj al la eksterlandano estas preskaŭ neatingeblaj sed por la ennaskulo estas saturitaj per sentvaloroj almenaŭ tiel ke lin dolore impresas aŭ tentas la mokrideto preskaŭ ĉio kio deflankiĝas for de la korekteco. Vi almenaŭ iufoje sentis indignon pro ia grava lingva eraro en sveda gazeto? En Anglujo oni zorgeme gardkontrolas la ĝustan uzadon de la gepatra lingvo, kaj oni estas multe pli sentema pri deflankiĝoj for de la bona lingvouzo ol ni svedoj kutimas esti. Tiu penso ke la anglan lingvon povus uzadi kaj misuzadi la popolgentoj de la tuta mondo efektive ne havas do multe da allogo por la angloj mem, eĉ se ili ŝatas vidi ke ilia lingvo estas studata en ĉiuj landoj de la mondo.

### Alia penseksperimento.

Tiu penso ankaŭ ne povas esti alloga por tiuj, kies gepatra lingvo estas la germana, la franca aŭ la rusa. Al ĉiuj tiuj grandaj nacioj sendube estus sento netolerebla, se iliaj gepatraj lingvoj estus flankenŝovitaj favore al la angla. Simpla penseksperimento povu evidentigi kiel karikature maljusta efektive estas tia solvo de la demando mondlingva. Ni pensu ke post tiu ĉi milito oni kolektos sin ne ĉirkaŭ unu sed ĉirkaŭ du mondlingvoj. Unu kompreneble estos la angla, la alia estos, ni diru, la franca (aŭ la rusa aŭ la germana aŭ la ĥina). Nur tiuj du lingvoj rajte povos esti uzataj en internacia interrilatiĝo. Sed al tio estos ligita la kondiĉo ke la angle parolantaj nacioj devas antaŭ forumo internacia uzi la francan lingvon kaj la france parolantaj nacioj la anglan. Ili havos malgraŭ tiu ĉi kondiĉo tre favoratan situacion, ĉar ĉiuj aliaj devas lerni du fremdajn lingvojn, dum ili kontraŭe forsavas sin per nur unu. Tiuj kiuj submetas sin al la klopodo lerni ne sole la anglan sed ankaŭ la francan povos, en vero, prave postuli ke la favorataj nacioj ne ekspluatu sian pli fortan situacion lingvan laŭ tute frakasanta maniero.

Ĉu iu kredas ke tia aranĝo de la aferoj estus aprobita de tiuj kies gepatraj lingvoj estus akceptitaj kiel mondlingvoj?

La opinio, ke ĉe internacia interŝanĝo de pensoj ne temas pri io alia ol interkompreniĝi, estas ja en si sana kaj ĝusta. La eraro de la kalkulo estas nur ke tio neniel povos efektiviĝi, dum oni obstinas volante superigi iun el la naciaj lingvoj al la rango kaj digno de la komuna lingvo de la tuta homaro. Nacia lingvo ne povos fariĝi mondlingvo se ĝi ne alpaŝos ĉiujn aliajn lingvojn naciajn, kaj pri tio, kompreneble, ne povas esti diskuto, ĉiukaze ne en nia epoko.

### La latinlingva epoko.

Dum la latino estis la lingvo de la instruituloj kaj de la eklezio romkatolika kaj de la diplomataro, la situacio

estis tute alia. La latino estas nenies gepatra lingvo. Neniu nacio havis la rajton ludi majstron por la aliaj, kiam temis pri la buŝa aŭ skriba uzo de la latino, kaj neniu sentis sin ofendita, minacita nek maljuste traktita pro tio ke aliaj parolis la latinon iom alimaniere ol li mem. Kiam la latino estis plej vivoforto kaj faris la plejmulton da utilo kiel lingvo internacia, oni ankaŭ ne estis pedante postulema ke ĉiuj devas skribi kaj paroli same kiel Cicero kaj Caesar.

#### Revenu al la latino.

Por ke la mondlingva demando povu solviĝi ni devas reveni al tiu situacio de la aferoj. En la nuna tempo ne ĉiuj, kiuj bezonas interkompreniĝi kun homoj ekster la propra komuneco lingva, havas tempon kaj monon por oferi multajn jarojn al lingvostudado. Tio kion ni nun bezonas estas latino simpligita, lingvo racie adaptita, kiu konservas la latino-grekan vortrezoron jam internacian kaj kiu estas samtempe tiel simpla kaj regula ke ĉiu ajn povas lerni ĝin en la popollernejo. Feliĉe ni posedas tian lingvon. Ĝi estis en uzado dum 57 jaroj en preskaŭ ĉiuj landoj kaj havas jam ampleksan literaturon en originaloj kaj tradukoj. Ĝi abunde montris sian uzeblecon kaj vivopovon. Faritaj provoj evidentigis ke ĝi kapablas redoni ĉiajn distingigojn kaj nuancojn de la pensoj kiuj povas aperi en la internacia kunvivado. En multnombraj kongresoj oni havis viglajn diskutojn kaj pasiajn debatojn en tiu ĉi lingvo, kaj multaj homoj prezentis en tiu ĉi lingvo imponan elekventecon.

#### Kontraŭstarantoj.

Se la mondo ne estus regata per tiel malmulta saĝo, kiel ĝi fakte estas, esperanto jam nun estus enkondukita en la lernejojn de ĉiuj landoj de la tero, kaj la mondlingva problemo estus solvita. Ke tiel ne fariĝis dependas tamen parte de tio ke mankis ne la kono sed la bona volo. Kiam la demando pri rekomendo de esperanto por enkonduko en la lernejojn estis diskutata ĉe la Ligoj de Nacioj, la franca registaro malebligis pozitivan solvon, ĉar ĝi timis ke esperanto povus kontraŭi al la franca la rangon de la lingvo de la diplomatio.

La plej multa kontraŭstaro al esperanto tamen bazas sur malsciado kaj antaŭjuĝoj. Kaj bedaŭrinde ĉe tio multaj lingvistoj — tute ne ĉiuj — havis malutilan influon. Kelkaj el ili kontraŭdiris, ke lingvo el la tipo de esperanto povus entute funkcii. Tiaj asertoj, kompreneble, falas teren pro la trombonfanfaroj de la praktika sperto. Neniu kiu ĉeestis esperantokongreson povas serioze insisti ke esperanto ne funkcias.

Ekzistas ankaŭ lingvistoj, kiuj principe aprobas esperanton, sed opinias ke ĝi suferas de difektoj en la detaloj kaj devas esti rekonstruita. Mi zorge observadis tiun lingvokritikon kaj devas bedaŭrinde diri tiun prijuĝon, ke ĝi estas plene nefruktodona kaj entute detruema, malgraŭ ke ĝi kompreneble ĝenerale devenis el la plej bona intenco. Ĉiuj lingvoj havas siajn neperfektaĵojn kaj mankojn, ne esceptante esperanton. Sed kiuj volas insisti ke esperanto estus missukcesa kaj ke ĝi estus verko de diletanto, tiuj maltrafas la celon. Esperanto estas — tion pli frue atestis kompetentaj lingvistoj — genia verko de riĉdotita filologo, kiu oferis la plej bonan parton de sia vivo por ĝin elpensi, elformi kaj perfektigi.

#### Post detala ekzamenado

de Ido, Occidental, Novial kaj Latino sine reflexione, la laŭnome plej konataj konkurantoj de esperanto, mi rajtas elparoli kiel mian opinion, ke ili ĉiuj estas konsiderinde malsuperaj al esperanto. Ido cetere estas nur dialekto de esperanto. Occidental estas pli facile komprenata sen studado ol esperanto, kondiĉe ke oni majstras jam la francan, anglan kaj germanan, sed ĝi certe estas senkompare multe pli malfacila por paroli kaj skribi. Novial estas konstruita de mondfama lingvisto, sed mia opinio estas ke, se aŭ esperanto aŭ Novial estu stampita kiel diletantaĵo, certe neniel estos esperanto.

Se oni demandas min kiamaniere la mondlingva demando estu solvita, mi respondas: Ĝi jam estas solvita. La problemo estas nur igi la solvon akceptita de la potenculoj.

Björn Collinder.

(El la sveda tradukis Paul Nylén.)

## Verdstelano en verda uniformo.

(Ie en la ekstrema arkipelago.)

En decembro 1944.

Iun mildsunan septembran tagon alvenas letero de Militpoŝto, Maristaro: ". . . vi estas vokita por 120-taga militservo ekde . . . en . . .".

Ellitiĝo je la 5-a matene. La aŭtobuso for de Stokholmo je la 6-a horo. Post duhora skuado en aŭtobuso plena de uniformitoj kaj uniformotoj ni alvenas al iu vintura haveno. Surŝipiĝo. Trihora starado sur ferdeko en trablovo. Jen ni alvenis al la kompanio. Nia kapitano — naskita en Kansas City — prezentas sin. Same faras leŭtenanto. Suboficiro alparolas nin ĝentile: bonvolu viciĝi po du. Bonvolu ekmarŝi. Prefere komencu per la maldekstra piedo . . . Kaj nun, "laŭ la ordono de l' Kompaniestro, ni manĝos lunĉon. . ."

Ni provas la novan, verdan uniformon.

Motorboato veturigas dekon da novicoj al dusemajna militlernejo. El la deko du estas puraj svedoj. La resto rekrutiĝis el anglo, germanoj, holandano, islandano, italo, rumano, ruso. Tri en nia grupo estas inĝenieroj, tri komercistaj ĉefoj, unu pastro, unu pianvirtuozo, unu ĉefvionisto kaj unu redaktoro.

Nia kapitano (en la civila vivo ĉefinĝeniero) alparolas nin: "miaj sinjoroj" . . .

Ni deĵoras en fora, izolita senhoma insulo. Dek ŝafoj troviĝas tie (sen ŝafisto!), ĉashundo "Seppi" (aparteninta al murdinto, kiu nun estas internigita en frenezulejo) kaj ĉarma, helgriza kato "Lotta" (kruciĝo inter angora kaj kutima katrasoj). La molhara hejmano kapfrote bonvenigas niajn krurojn, kiam ni envenas domen nokte jen je la 1a, jen 3a, jen 5a matene . . . .

Ni raportas pri flugmaŝinoj kaj ŝipoj. Iufoje savas estonajn ŝiprompitojn. Iamaj ministro, direktoro, oficiro, kiuj alvenas en disŝiritaj vestoj, foje en nura ĉemizo. Iia nura veturprovizo: cigaredo kaj konjako. Alia grupo kunhavas manĝaĵon netuŝitan. Ili ne kuraĝis manĝi — pro manko de akvo. Oni ne volis kreskigi la senton de soifo. Niaj savitoj avide trinkas varman ĉokoladon de svedaj soldatoj. Ili ne havis okazon por tio dum kvin militjaroj . . .

Iufoje ne alvenas la ŝipeto de l' rifuĝintoj. Sole botelpoŝto. Kian tragedion povas enhavi simpla botelo por biero aŭ limonado: ". . . . Afabla elfiŝinto de ĉi botelo bonvolu transsendi nian lastan saluton al niaj parencoj en Estonio, urbo . . . . strato . . . . n-ro . . . . Preĝu por niaj animoj!"

Jen sunleviĝo orumas ĉirkaŭan ondaron, jen sunsubiro verŝas sangon sur la maron. Luno kisas arĝenton surakven aŭ stelaran tremon respegulas trankvila akvosurfaco. Iufoje dika nebulo volvas nin en sian grizan pelton, aliffoje uragano skuas nian elrigardan turon kaj ĵetas ondegojn surborden.

Dimanĉe ni kolektiĝas ĉirkaŭ varmiga fajro de malfermita soldatkameno, aŭskultas altigajn vortojn de monaka kolego kaj demandas silente en niaj koroj: Kial ne la tuta homaro povas kolektiĝi ĉirkaŭ anima fajrujo de internacia amo kaj kompreno por egale varmigi ĉiun homan familianon?

Nur unufoje semajne venas al ni ŝipo kun poŝto. Ekstere ventoj vipas obstinan ondaron. Ĉu simbole pri la tutmonda milito? Sed ni scias ke vipoj ne venkos. Post sanguragano denove brilos multkolora ĉielarko de interpopola paco!

Blovas freŝiga vento. "Ventoj subitaj velkintajn foliojn deŝiras. . ." Nia internacia soldatgrupo unuvoĉe kantas en amoporta esperanto: "Mariston logas vasta mar' . . ."

Kun Kristnaska saluto:

238—40—41 Morariu.

P.S. Kun ĝojo mi sciigas ĉi momente ke nia miltservo estas reduktita por tri monatoj kaj novjare mi denove povos dediĉi miajn fortetojn al Esperanto.

## Tra multkolora vitro.

Ekster la urbo troviĝis malnova vitrofarejo. Kiam oni estis infano, oni ĉiam dum promeno haltis ĉe ĝi, ne por rigardi la belajn vitrajn objektojn, videblajn tra la fenestroj, sed por admiri la amason de vitrospecetoj, kiu kuŝis proksime. Ĝi similis al piramido el kristalo kaj multkoloraj juveloj, kaj estis ĉiam same granda plezuro elekti kelkajn brilajn pecojn kaj tra ili rigardi la ĉirkaŭaĵon. Kia alloga mondo malfermiĝis antaŭ la infanaj okuloj! Pala ĉielo iĝis blua kiel cejana kampo, la blankaj mevoj ŝajnis sorĉaj rozkoloraj birdoj kaj la galioj ĉe la vojo pompis je ruĝaj plumoj.

Plej bela estis la flava vitro, ĉar ĝi donis al la pejzaĝo tiom varman brilon, kvazaŭ ĝi estus envolvita per ora veluro. Kaj la infano nekonscie revis pri iu ĉarma malproksima lando, kie ĉiam regas suno kaj somero, la floroj neniam velkiĝas kaj kie ĉiuj homoj estas bonaj kaj feliĉaj.

Povis ja okazi, ke inter la brilaĵoj kuŝis iu speco malhela kaj malpura. Sed ho, kiom trista aspektis tra ĝi la regiono! Suno kovris la vizaĝon per nigra vualo, kvazaŭ cindro kuŝis sur la silkaj floroj de l' rozujoj, la maro ondis minaca kaj griza.

La tuta mondo funebris. Estis mirinde tuj poste vidi la oran lumon reveni kaj transformi la ombran landon je suna paradizo!

Kiam mi multajn jarojn poste faris vojaĝon al sudo kaj post vizito en iom malvarma Germanujo transiris la italan limon, tiam ŝajnis al mi, ke mi venis al la fantazia lando de mia infaneco. Sama ora lumo, same varmaj koloroj! Kaj bluega ĉielo super ĉio sin volbis, super la Dolomitaj regionoj, la Sicilia Edeno, super ĉarmaj vilaĝoj kaj urboj.

Venecio! Mirinda perlo de Adriatika Maro! Kiel fatamorgano vi levas vin el la ondoj kun viaj kupoloj kaj brilaj fasadoj. Rava mi trovis vin en sunlumo, kiam turoj kaj mur-dentoj similis al oraj punktoj, same alloga en nokta ilumino, kiam vi dormetis sub stelplena volbo.

Ĉu vere ekzistas pli bela loko ol la placo de San Marco? Ŝajnis al mi, ke mi rigardas tra iu sorĉa vitro, ĝuante la vidaĵon de la miriada de kolomboj, la fabela templo el marmoro, mozaiko kaj oro, la flave-stria Dodge-palaco kun siaj gracilaj kolonoj.

Kaj tuj proksime la sunbrila laguno, kie glitas boatoj kun flavaj kaj flame ruĝaj veloj. Nigre okulaj vendistoj tentas la fremdulon per silkaj tukoj kaj kristalkolieroj. Gondolistoj gaje svingas siajn larĝgrandajn ĉapelojn, invitante al kanala veturo.

Inda fino de ĉarma tago estas vespera festo sur la laguno. La ŝipetoj estas ornamitaj per multkoloraj lanternoj kaj milda muziko akompanas la ondan plaŭdadon.

Romo, urbo eterna! Kiu, iam vidinte vin, povus forgesi vian ĉarmon kaj belecon! Nekomparebla vi estas kun viaj imponaj monumentoj kaj antikvaj restaĵoj, belaj parkoj kaj muĝantaj fontanoj. Denove mi volus vidi la brilan kupolon de San Pietro, la florbudojn sur Piazza di Spagna, denove ĝui la foirajn scenojn de Campo di Fiore kaj la sunsubiron de sur la pinto de Gianicolo. Mi memoras la monaĥejon, kiun ni dumvoje preteriris. En la ĝardeno, prilumita de la ruĝa sunĝlobo, maljuna monaĥo meditis sub floranta arbo. Bildo de paco kaj harmonio!

Palermo! Al ora konkro vi similis, portita de bluj ondoj al suna bordo! Belega vi estis kun palacoj kaj monaĥejoj inter oranguloj kaj palmoj, kaj viaj riĉe ornamitaj preĝejoj! Ekster la grandioza katedralo staris bananarbo kun maturaj fruktoj en la supro. Kiel giganta ruĝa fungo brilis inter abunda verdaĵo la kupolo de San Giovanni, en kies ĝardeno malnova fonto plaŭdis kaj pampelmoj pendis de la branĉoj.

Festa spektaklo estis la miksita stratvivo. Interesaj tipoj, vigla komerco! Ruĝaj ĉaroj bruis kontraŭ la pavimo kaj la azenoj, jungitaj al ili, ŝajnis pupaj bestoj kun tintiloj, plumoj kaj silkaj rubandoj.

Neforgesebla estas la grandioza artfajrado, kiu finis memorfeston de iu sanktulino. Ĝi ankoraŭ daŭris, kiam nia ŝipo noktmeze elglitis el la haveno kaj la lasta impresado de la sicilia ĉefurbo estas brilaj stelkaskadoj kontraŭ nigra firmamento.

Depost tiu tempo pli intensaj, pli danĝeraj fajradoj eklumigis la noktojn de Palermo.



Kiom profunde oni ĝuis ĉiujn interesajn travivaĵojn, kiom avare oni englutis ĉiun novan impreson! La arto de Florenco, la akvoludo de Villa d'Este, la beleco de Napolo, la bluega Mediteraneo, ĉio ravis kaj ensorĉis. Kaj ne nur naturo kaj arto, sed ĉefe la homoj mem, tiu ĉarma popolo kun suno en okuloj kaj rideto sur lipoj. Tre efikis al iom afekta, ceremonia nordlandano ilia simpleco, afableco, ilia viva temperamento, ilia kontenteco pri malmulto, ilia kapablo ĝui la momenton sen ĉagreno pri morgaŭaj zorgoj.

Jen la maljunulino sur strateto en Monreale, kiu sidas kun sia nuksa korbo inter kroantaj infanoj kaj blekantaj kokoj! Ŝia vizaĝo radias de ĝojo pro kelkaj moneroj. Jen sur la pinto de Vesuvio la gitarludisto, kiu kantas kaj ludas kun ĝoja koro! Lia voĉo vibras pro feliĉo pri la nura ekzisto, pri la klara ĉielo, la blua golfo.

Kie, se ne en tiu lando de suno kaj beleco, la homoj devus esti feliĉaj?!

\*

Sed minacaj nuboj aperis ĉe la horizonto. Militaj tondroj ekbruis, brulego eksplodis disvastiganta de lando al lando.

Pacemaj nacioj devis oferi siajn junajn filojn sur la altaro de milito. Kampoj kaj vilaĝoj estas bruligitaj, tutaj urboj estas diserigitaj.

Nia bela tero estas transformiganta je mondo el ruinoj kaj cindro.

Ankaŭ la lando de suno kaj ĝojo devis suferi pro la terura katastrofo, disportanta morton kaj pereon en ĝiaj paradizaj regionoj. Kiom nun restas el la mirindaj preĝejoj de Palermo, la blankaj domoj de Napolo, la grandioza haveno de Genevo, la elegantaj kvartaloj de Milano? Monte Cassino, la plej malnova monaĥejo de Eŭropo, estas detruita. Villa d'Este, la fama renesanca palaco, ne plu ekzistas. La katedralo de San Marco kaj la Dodge-palaco estas difektitaj. Neanstataŭeblaj monumentoj kaj artaĵoj estas perditaj.

Sed restas la eterna urbo. Ankoraŭ San Pietro levas sian brilan kupolon al la ĉielo kvazaŭ simbolo de la venko de l' amo kaj vero super malamo kaj perforto.

La homaro ĝemas sub peza jugo. Sed proksimiĝas la tago de libereco. La malhela nokto cedos al ora lumo. La morta kanto ŝanĝiĝos je himno al la vivo. — Paco fine revenos al sanganta, suferanta tero.

Ella Nilson.

# Esperanto-magasinet 3a Rapsodio

har utkommit.

Redigerad av Dro F. Szilágyi.

Pris 2.00 vid förskottslikvid.

2.25 vid postförskottslikvid.

I original eller översättning äro bl. a. följande författare representerade:

Peter Freuchen	Frigyes Karinthy	Paul Nylén
Dan Andersson	Sven Backlund	Ella Nilson
Björn Collinder	Anton Čehov	Einar Adamsson
	John Stenström	

jämte ett flertal andra, som i poesi eller prosa ge oss ett urval god esperantoläsning.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack 698, Stockholm 1. Postgiro 578

## Att välja på

till Bokens Dag den 15 dec.

Sveda Antologio, en utvald samling litteratur.. 10:—  
 Gösta Berling, S. Lagerlöfs stora skapelse .... 7:50  
 La ringo de la generalo av S. Lagerlöf ..... 2:—  
 Hinda rigardas Svedlandon, av L. Sinha, rikt ill. 3:75  
 Tra sovaĝa Kamĉatko, av Sten Bergman, rikt ill. 6:—  
 Hasse Z — humora novelaro ..... 2:—  
 50 jarojn kun Paul Nylén, svensk-esp. historia 2:—  
 Stellan Engholms tre originalnoveller:

Al Torento .....	1:20
Infanoj en Torento .....	2:—
Maljunulo migras — Venĝo	1:50
Infanoj de Betlehem, av Selma Lagerlöf.....	0:75
Pasko, av Aug. Strindberg .....	1:50
Konscienco riproĉas, av Aug. Strindberg .....	0:60
Dua Rapsodio (red. av F. Szilágyi) .....	2:—
Tria Rapsodio " " " " .....	2:—
H. C. Andersen — liaj vivo kaj verko .....	2:—

Till ovanst. priser kommer 15 proc. för oms. o. porto

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack 698, Stockholm 1, Postgiro 578

## Ett Julpaket

för 2: — kronor

Det innehåller:

10 Esperanto-julgransflaggor, grön med vit stjärna

5 Julkort med esperanto-text

5 Jul-och nyårskort med esperanto-text

Angiv endast: "Julpaket, 2 kr.", och vi exp. Läger Ni till 1 kr. sända vi även en esperantostjärna för Edert rockslag eller Er klänning.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack 698, Stockholm 1, Postgiro 578

